# VERDA FAMILIO

Nepravidelný dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku Klubu pracujících v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor – Dr. Josef Hradil, Mnichovo Hradiště 325
Cena: dobrovolný příspěvek
Povolil ONV Mladá Boleslav, odbor kultury čj. 145/74 – 456/4

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Septembro 1987 Numero 3 Číslo Září 1987

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

72-a Universala Kongreso en Varsovio (25.7.-1.8.1987) partoprenis pli ol 6000 vizitantoj el 70 landoj (300 el ČSSR, 300 el Japanio, krome delegitoj el 14 afrikaj kaj arabaj landoj). Ĝi estis la plej granda UKo en la historio kun forta propagando en televido, radio kaj gazetaro. Patronis ĝin la parlamentestro de PPR marŝalo Roman Malinowski, bialistokano laŭdevena, kiu iniciastis solenan fondon de la granda konstruaĵo de Esperanta Kultura centro en Bialistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof. Estis anoncitaj du grandaj financaj fondusoj por konstruo de Esperanto-centroj en Afriko kaj Azio. La UKo de la jubilea jaro pasis kun signo de la granda entuziasmo kaj bonaj perspektivoj, kiel rikolto de bona propaganda laboro de la lastaj jaroj. Dignan medion por la solenaĵoj faris spacoj de fama varsovia Kulturpalaco kaj ĉiuflanka subteno de la pola registaro. Marŝalo Malinowski estiĝis eĉ membro de la pola Esperanto-asocio. Sukceso de la UKo certe eĥos ankaŭ en vivo de la naciaj esperanto-asocioj, se ili ĝin konvene eluzos same kiel la rezolucion de UNESCO, kiu rekomendis uzadon de E-o dum interŝtataj agadoj kaj ĝian enkondukon en la lernejojn.

72. Světový kongres ve Varšavě (25.VII.-1.VIII.1987). Účastnilo se 6000 návštěvníků ze 70 zemí (300 z ČSSR, 300 z Japonska, mimo to delegáti ze 14 afrických a arabských zemí). Byl největším Světovým kongresem v historii, silně propagován televizí, rozhlasem a tiskem. Zaštítil ho předseda polského parlamentu maršál Roman Malinowski, původem z Bialystoku, který dal podnět k slavnostnímu založení velké budovy Esperantského kulturního střediska v Bialystoku, rodném městě Zamenhofa. Byly ohlášeny dva velké finanční fondy pro vybudování esperantských center v Africe a Azii. UKo jubilejního roku proběhl ve znamení velkého nadšení a dobrých perspektiv, jako žeň dobré propagační práce posledních let. Důstojné prostředí slavnostem vytvořily prostory známého varšavského kulturního paláce a všestranná podpora polské vlády. Maršál Malinowski stal se členem polského esperantského svazu. Úspěch UKo najde ozvěnu také v životě národních esperantských svazů, jestliže ho náležitě využijí, stejně jako rezoluce UNESCO, která doporučila užití E-a v mezistátních jednáních a jeho zavedení do škol.

5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto Asocio (11.-13./9.87) okazis en Nacia Domo en Olomouc. Partoprenis 250 personoj, inter ili 140 delegitoj. La kongreso estis brile organizita de anoj de la loka rondeto, kiuj preparis por la partoprenantoj neforgeseblajn travivaĵojn. Dro Jermář en sia ĉefa referaĵo detale informis pri la kvinjara agado de la estinta estraro, sen evito de kritiko pri multaj agadkampoj, nesufiĉe eldona agado, precipe de prokrasta eldonado de Starto, asocia bulteno kaj ĉefa ligilo de ĉeĥaj esperantistoj. Sekvis diskuto, en kiu malkaŝe oni parolis pri ĉiuj problemoj kaj agadoj. Multaj proponoj, kiuj celas plibonigon de la agado de nia asocio, estis faritaj. La delegitoj elektis novan komitaton, kiu principe juniĝis. En la fronto de la estraro staraj nova prezidanto ing. Petr Chrdle el Černošice apud Prago, 41-jara fervojisto, bone konata funkciulo en la esperantista medio. Nova sekretario, kiu gvidos sekretariejon en Jílská ul. en Prago estas s-ano Karel Franc el Pardubice, longjara kunorganizanto de SET Lanĉov kaj gvidanto de korespondaj kursoj. La kongreso estis ankaŭ grava socia okazaĵo renkontiĝo de longjaraj e-funkciuloj, kiuj ĝuis okazon ankaŭ de kultura programoj, altvaloran recitadon de Seemanová (Halas: Nia sinjorino Božena Němcová), arĉkvarteton de Jan Drda, dancmuzikon de Barbuloj, orgenmuzikon (koncerton en preĝejo de sankta Venceslao. Ĉie sonis ankaŭ eĥo de la Universala Kongreso en Varsovio, ĝiaj impresoj, spertoj, travivaĵoj. Kongreso en Olomouc en jubilea jaro estis vere promesplena kaj sukceso de esperantista agado dependas nur de aktiveco de la asocianoj.

Kongresaj notoj: Granda nia surprizo estis sabata vespera manifesta procesio proksimume 500kapa, ĉefine celanta flormetadon al la monumento de Esperanto en la urba parko. Ĝi estis gvidata de taĉmento de uniformitaj knabinoj (*maĵoretinoj*) kaj olomouca blovmuzikorkestro. Urba trafiko paralizis, asistis trafika polico. Kvankam multaj taksis paradan procesion por nia movada ideo nekonvena, la sukceso estis evidenta.

5.kongres Českého esperantského svazu byl uspořádán v Národním domě v Olomouci (11.-13.9.87) Účastnilo se 250 osob, mezi nimi 140 delegátů. Kongres byl skvěle organizován členy místního kroužku, který připravil účastníkům nezapomenutelné zážitky. Dr Jermář ve svém hlavním referátu zevrubně informoval o pětileté činnosti bývalého předsednictva, aniž se vyhnul kritice mnoha částí činnosti, nedostatečné vydavatelské činnosti, zvláště opožděnému vydávání Starta, svazového bultenu a hlavního pojítka českých esperantistů. Následovala diskuse, v které se neskrytě hovořilo o všech problémech a činnostech. Bylo předneseno mnoho návrhů směřujících k zlepšení činnosti našeho svazu. Delegáti volili nový výbor, který podstatně omládl. V čele předsednictva stanul nový předseda ing. Petr Chrdle z Černošic u Prahy, 41-letý železničář, dobře známý funkcionář v esperantském prostředí. Nový tajemník, který povede sekretariát v Jílské ulici v Praze, je s-ano Karel Franc z Pardubic, dlouholetý spoluorganizátor SET v Lančově a vedoucí písemných kursů. Kongres byl také důležitou společenskou událostí – setkáním dlouholetých e-funkcionářů, kteří měli požitek také z kulturního programu, krásné recitace Evy Seemanové (Halas: Naše paní Božena Němcová), smyčcového kvarteta Jana Drdy, taneční hudby Barbuloj, varhanní hudby (koncert v chrámu sv. Václava). Všude zněla také ozvěna Světového kongresu ve Varšavě, jeho dojmy, zkušenosti, zážitky. Kongres v Olomouci v jubilejním roce byl skutečně nadějný a úspěch esperantské aktivity je odvislý jen od aktivity členů svazu.

Kongresové poznámky: Velkým překvapením byl sobotní večerní manifestační 500hlavový průvod, končící kladením kytky k pomníku Esperanta v městském parku. Byl veden skupinou uniformovaných děvčat (mažoretek) a olomouckou dechovou hudbou. Městská doprava byla zastavena, asistovala dopravní policie. Ačkoliv mnozí považovali pochod pro naše hnutí za nevhodný, úspěch byl evidentní.

EK/MH 86/87

- Fine de la jaro 1986 estis en ĈEA 2160 anoj. (Slovakia asocio havas 2500!) - Prepariĝas kunlaboro kun monda filatelia ekspozicio Prago 1988. - Ekzamena komisiono aprobis 28 novajn instruistojn. - Nova lernolibro de Drino Barandovská aperos en SPN 1988. - La plej multekosta eldono estis de Kamarýt: historio de E-movado en CS – spite montriĝis nesufiĉe intereso. - La nova vortaro esperebe eldoniĝos en la j.1989. - Korespondajn kursojn 1984-1986 aliĝis 2300 lernantoj. 18 lektoroj. Nur ono aliĝis al la asocio. - Spite 2.700 brigadaj laborhoroj la refreŝiĝa centro en Bor apud Tachov estis nur duone rekonstruita kaj nun vendita. - 20.-24.IV.88 okazos en Strážnice pedagogia seminario kun eksterlanda partopreno. - MEM preparas konferencon en Kladno kaj amasan partoprenon en la MEMkonferenco en Budapeŝto (per aŭtobusoj). - Ing Hudera (diskuto): Celo de la kongreso estas unue renovigi agadon de la asocio. Slovakoj montras, kiamaniere propagandi. - Vlková: Estas bezonata distra bulteno internacia, kiu enhavus diverstemajn artikolojn, ne nur movadajn. - Ing Havlík: Fotbala (piedpilka) taĉmento de kooperativanoj partoprenos pied-pilkan vetkuron en Turkio. - Ing. Němec (Slovakia EA): Prelegoj de lingvistika seminario en Altaj Tatroj estis eldonitaj. Estas proponata ĝemeliĝo de E-rondetoj ĉeĥaj kaj slovakaj. Antaŭvidata estas kunordiga komisiono por agado de ĈEA+SEA. - Nur 30% de la lernantoj de korespondaj kursoj finstudas. Mankas informoj+literaturo. (Dro Škoda). - Sittauer: Lanĉov nun = 170 litoj en kabanoj! Finance prospera nur kunlaboro kun Ĉedok. - Vychodil: Aŭroro (bulteno por blinduloj presata per Braile-presmaniero) estos dissendata en eldonkvanto 550. Bona magnetofona servo. - Chytil: Přerovanoj organizis panelan ekspozicion pri 100jara jub. de Eo. - Vaněček (handikapuloj): ni postulu sekve de UNESCo rezolucio enkondukon de Eo en lernejojn kiel nedeviga objekto. 1000 jaroj oni revas pri paco– 100 jarojn oni revas pri komuna lingvo. Kaj ni ne deziras reen areo de revoj

EK/MH 87/87

- Koncem roku 1986 bylo v ČES 2160 členů (Slovenský svaz 2500). - Připravuje se spolupráce se Světovou výstavou známek Praga 1988. - Zkušební komise potvrdila 28 nových učitelů. - Nová učebnice Dr Barandovské objeví se v SPN 1988. - Nejdražší bylo vydání Kamarýtových dějin esperantského hnutí v Československu – ačkoliv se ukázal nedostatečný zájem. - Nový slovník snad bude vydán v r.1989. - Korespondentní kursy: 1984-86 přihlásilo se 2300 žáků. Jen zlomek se přihlásil do Svazu. - Ačkoliv bylo odpracováno 2700 brigádních hodin na rekreačním středisku v Boru, bylo jen z poloviny rekonstruováno a nyní prodáno. - 20.-24.IV. bude ve Strážnici pedagogický seminář se zahraniční účastí. - MEM připravuje konferenci v Kladně a hromadnou účast na sjezdu v Budapešti (autobusy). - Ing Hudera (diskuto): cílem kongresu je v první řadě obnovit činnost svazu. Slováci nám ukazují, jak propagovat. - Vlková: je zapotřebí zábavný magazin mezinárodní, který by obsahoval různé články, nejen z hnutí. - Ing. Havlík: Fotbalové družstevnické mužstvo se zúčastní fotbalového turnaje v Turecku. - Ing Němec: (Slovenský svaz): Přednášky lingvistického semináře ve Vysokých Tatrách byly vydány. Je navrhována družba českých a slovenských esperantských kroužků. Očekává se zřízení koordinační komise pro činnost ČES a SEZ. - Dr Škoda: Jen 30% žáků korespondentních kursů skončí. Chybí informace+literatura. - Sittauer: Lančov nyní = 170 lůžek v chatkách. Finančně přínosná jen spolupráce s Čedokem. - Vychodil: Aŭroro (buletin slepců tištěný Brailovým písmem) je rozesílán v množství 550 výtisků. Dobrá magnetofonní služba. - Chytil: Přerováci organizovali panelovou výstavu k 100 jubileu Eo. - Vaněček (invalidé): žádejme v návaznosti na resoluci UNESCo zavedení Ea do škol jako nepovinného předmětu. 1000 let se sní o míru – sto let o společném jazyku a my nechceme zůstat v oblasti snů.

- S-ano Blažek proponas agadi por restarigo de monumento de LL Zamenhof en Františkovy Lázně, kiu estis la unua Eŭropo. - Vaněček: Laŭ provaj varbadoj facile oni provas gajni 1% de invalidoj por lerni E-on per korespondaj kursoj-dum 1 jaro povas havi 2400 anojn! - Štruncová: En Prago okazos ankoraŭ kelkaj solenaĵoj jubileaj. 100 aliĝiloj por la buŝa kurso en Kadaňská ul. - Stibůrek: kunlaboron kun Ĉinio! Disvolvi turisman agadon. Gajni spacon por centra librejo. - Staňura: kritike kontraŭ „Praga skolo“ – pluaj neologismoj nebezonataj. - Špína Lbc: disvastigu adresarojn. - Dro Mohapel: propagandi en distriktoj, kie estas rondetoj. - Rýznar: Jam LL Zamenhof diris, ke la plej granda malamiko de la movado estas propraj disputoj. - Chrdle: Metrika sistemo estis proponita 1750 en F, akceptita post franca revolucio 1795 – internacie 1895, sed en USSR 1917, GB 1976 kaj en Usono oni atendas akcepton en 1995. Pro tio ni ne malesperu kaj batalo por enkonduko de Eo kun la sama forto.

S-ano Blažek navrhuje obnovení pomníku LL Zamenhofa ve Františkových Lázních, který byl první v Evropě. - Vaněček: Podle zkušebních náborů je možno snadno získat 1% invalidů do písemných kursů učení Esperanta – tak může mít sekce invalidů během 1 roku 2400 členů! -Štruncová: V Praze bude uspořádáno ještě několik jubilejních akcí. - Stibůrek: Spolupráci s Čínou! Rozvíjet turistiku. Získat prostor pro centrální knihovnu. - Staňura: kriticky proti „Pražské škole.“ Další neologismy nejsou potřebné. - Špína Lbc: rozšiřujte adresáře. - Dro Mohapel: propagovat v okresích, kde jsou kroužky. - Rýznar: Už LL Zamenhof řekl, že největším nepřítelem hnutí jsou vlastní nesváry. - Ing.
Chrdle: Metrická soustava byla navržena 1750 ve F, přijata 1795 Velkou franc. revolucí, zmezinárodněna 1895, ale v SSSR 1917, GB 1975 a v USA očekává se přijetí 1995. Proto nezoufejme a bojujme o zavedení Esperanta stejnou silou.

<u>Eli Urbanová: PRINCIPA MISKOPRENO</u> Jen almenaŭ fluga respondo je la artikolo „Ĉu nova batalo?“ kiun alportis VERDA FAMILIO nro 1 marto 1987: Al D-ro Hradil: Jes, principa miskompreno, ĉar la aŭtoro de ABUNDE KAJ REFUNDE ne celas reformi Esperanton, sed disvolvas longe ekzistastantajn proponojn. Ekzemple „de“ kun akuzativo – PLENA ANALIZA GRAMATIKO de Kaloscay-Waringhien, eldonita en la jaro 1980, par.135, paĝo 201 diras „Solvon pli konforman al la spirito de nia lingvo prezentus la uzado de akuzativo post la prepozicio de, analoge al la uzado de akuzativa prepozitivo por montri la celon: la manĝo de la raton; sed ĝis nun ĝi estis proponita, ne praktikata.“ Ktp. - Al Cíchová: Unue – la eseo de Josef Rumler ne estas destinata por „simplaj kaj meznivelaj esperantistoj“, due – se vi kiel tradukistino ne sentas bezonon sinonimoj kaj kontentiĝas per malbelaj kunmetaĵoj kaj derivaĵoj – via afero, eĉ tiel oni povas „dum tridek jaroj diri multon“! - Al Šmidrkalová: Laŭ vi la sciencistoj_ rajtas riĉigi la lingvon, sed la literaturistoj ne, cetere se vi „ne komprenas la tekston de la suplemento, vi ne povas serioze kritiki ĝian enhavon. Vian kontribuon krom io grave degradas la sarkasma moka tono. - Al Vaněčková: Kiel vi volas diskuti pri lingvaj demandoj ne posedante fundamentajn helpilojn: PAG kaj PIV? Unu via rimarko estas utila: Neniam plu mi uzos la formon „Chlumeco“! - Al red. Howard: Similan paskvilan, ŝokontan la legantojn. Verkis ankaŭ Baghy, mia granda autorita; nu la tempo pravopis Kaloscayon, ĉar plimulto da esprimoj, kiujn li en ĝi uzis, troviĝas nun en PIV. Por la trankvilo de la esperantistoj-oponantoj mi retajpas fragmentojn el Kaloscay, lia LINGVO, STILO, FORMO, eldonita en la jaro 1931, do antaŭ pli ol 50 jaroj: „La alia vojo estas pligrandigo de la esperanta

vorttrezoro, la tiel nomataj neologismoj. Tre delikata temo! Rilate ilin la esperantistojn oni povas dividi en du grupojn, en propagandistojn kaj literaturistojn. La propagandisto volas facilan Esperanton, kiun li povus verŝi rapide per funelo en la kapon de ĉiu homo. Li estus feliĉa, se la lingvo konsistus el 200 vortoj, se oni povus skribi sur poŝtkarton la tutan gramatikon kaj la tutan vortaron kun la himno. Li estus tre kontenta se post sessemajna kurso ĉiu parolus flue kaj komprenus sen vortaro la kolektitajn verkojn de Shakespeare, Dickens, Wells kaj Shaw. La literaturisto volas riĉan lingvon, volas havi apartan vorton por ĉiu vorto de sia nacia lingvo, apartan vorton por ĉiu nuanco, laŭeble radikvorton, ĉar la vortoj tre derivitajn kaj kunmetitajn li sentas artefaritaj, malfortaj, senkoloraj." Tiom Kaloscay en la jaro 1931. Do nenio nova sub la suno, vidu.

Aldono de la redaktoro: Estas mia devo fermi diskuton pri neologismoj, kiu havas siajn radikojn en la tuta historio de nia lingvo. Koleraj kontraŭopinioj, kiuj aŭdiĝis post apero de „Abunde kaj redunde" ne nur en nia lando sed ankaŭ forte en Varsovio, avertu niajn poetojn. Iliaj verkoj kaj meritoj estas agnoskataj, sed ili timu ignoradon de la legantaro, se iliaj verkoj abundos per esprimoj, kiuj postulas novajn vortarojn aŭ listojn de neologismoj. - Nia bulteno ne intencas publikigi pluajn kontribuaĵojn tiutemajn.

Esperanton en la rilatojn inter ĈSSR kaj ĈPR! Tio estas konciza enhavo de la alvoko de rondeto en Benešov, kiun ĝi antaŭmetis al la kongreso en Olomouc. Disvolviĝantaj rilatoj devus esti laŭ tiu alvoko instigo por apliko de Eo en oficialajn kontaktojn interŝtatajn, event.por propono de ambaŭ naciaj E-asocioj peri la tradukan laboron. Samtempe ĝi alvokas E-istojn por disvolvo de personaj amikaj kontaktoj kun ĉinaj esperantistoj. Skribu al Václav Stibůrek, J.Franka 1731, 25601 Benešov

Esperanto do vztahů mezi ČSSR a ČLR! To je stručný obsah výzvy kroužku v Benešově u Prahy, kterou předložil kongresu v Olomouci. Podle této výzvy rozvíjející se vztahy by měly být podnětem k aplikaci esperanta v oficiálních stycích mezistátních, eventuelně pro návrh obou národních svazů zprostředkovat překladovou práci. Současně vyzývá esperantisty k rozvíjení osobních přátelských styků s čínskými esperantisty. Václav Stibůrek, J.Franka 1731, 25601 Benešov u Prahy.

Jubileaj solenaĵoj de la praga klubo: 23.IX.87: solena koncerto de kantistoj de Nacia teatro – violonĉela koncerto de Dro Sádlo-Páv. - 16.IX.: Enplantigo de memora tilio en Parko de N.Krupská kontraŭ la klubejo Vršovice, Kodaňská ul.15.horo. - 22.XI. Ŝakturneo en la klubejo Kodaňská. Aliĝu ĉe V.Štěpánek, Macurova 16, 14900 Praha 4 Chodov.- 23-29.XI. konkurso de fotografaĵoj kaj desegnaĵoj kun e-temoj en la klubejo Praha 1, Vojvodova 1 – informo Ing Zbyněk Khail, Václavkova 10, Praha 6. - 6.-.7.13.XII. samloke ekspozicio de slojdaĵoj (ruční práce). Inf. Ludmila Křesinová, Litvínovská 523, 19000 Praha 9, Prosek.

Jablonec n.Nisou esperanto-klubo, preparas la 5an de decembro Nikolao-vesperon kaj 23an de aprilo pacmarŝon 5-35 km kun restado en kabano Proseĉ. Informoj. EK Jbc 46621, p.s.190 KaSS. - Tranoktoj mendeblaj.

Libroj en nia Ĉeĥa Esperanto asocio, 11000 Praha 1, Jílská 10: Vondroušek: Ĝojoj de mia vivo 16 Kčs.- Vinař: Skandalo pro Jozefo. 72p. 26Kčs.- Eli Urbanová El subaj fontoj. 96p. 16Kčs – Historio. de E-movado en Ĉeĥoslovakio-Kamarát. 254p. 42 Kčs. - Novobilský: Česká literatura v Esperantu. 32p. 9Kčs. - Terminaroj: jurista, medicina, hidraŭla, komputika ktp. - Fotografaĵojn: Saluton el Ĉeĥoslovakio. - Meze de Eŭropo (faktoj pri Ĉeĥoslovakio) 15 Kčs. Multaj Insignoj, surgluaĵoj, lernolibroj, vortaretoj. Ĉeĥa-esp.vortaro – Hromada – fotokopiaĵo. Propisoto. Flagoj. Gramodiskoj Barbuloj.

Adolf Bartošík, pedagogo kaj konata filatelisto ĝisvivis la 1-an de majo premiojn. Li akceptu koran dankon kaj bondeziron!

EK/MH 89/87

Pri la rezultoj de la TRADUKA KONKURSO en la sezono 1986/87: En la grupo P (progresintoj) partoprenis 18 esperantistoj, en la grupo K/P tradukis el Eo ĉeĥlingven 15 personoj kaj en la komencanta grupo „K“ 16 personoj. Ĉiuj, kiuj plenumis la tutan serion da taskoj, ricevis sciigon pri la rezulto en koncerna grupo. Permesu al mi, ke mi menciu almenaŭ unu frazon pri la rezulto en grupo „P“: „Sen flato mi povas aserti, ke la kapablo de vi ĉiuj estas tiom alta, ke ne estas problemo por vi traduki kiun ajn tekston el la ĉeĥa tagĵurnalo aŭ revuo. Ĝojas min, ke la grupon K/P mi povas laŭdi. Ĉiuj tradukoj estis en bona stilo. Ĝojiga fakto ripetiĝas ankaŭ nunjare: Kresko de lingvokapablo ĉe ĉiuj, kiuj eltenis ĝis la fino! Ankaŭ la grup K (komencantoj) laboris tre bone, tradukis el Eo ĉeĥlingven kaj mi esperas, ke ili akceptos la tradukadon en la grupo K/P en ĵus komencanta sezono. Por mi persone fariĝis la tuta nombro de 49 esperantistoj simpatia TRADUKA GRUPO. Ĝojas min sincere intereso de ĉiuj partoprenantoj. Iujn mi jam persone renkontis, kun la ceteraj mi ankaŭ dezirus persone kontaktiĝi. Al ĉiuj, kiuj deziras partopreni en la sezono 87/88 mi sendos en septembro-aprilo 3-4 tradukotekstojn. Ĉiujn legantojn de VERDA FAMILIO salutas afergvidanto de TRADUKA KONKURSO: Zdeněk Řezáč, Vítězná 355, 46841 Tanvald. (Ne hezitu kaj ankaŭ vi aliĝu ĉe la anoncanto! Noto de la redaktoro)

Sekcio de handikapuloj: esperdone disvolviĝas. Laŭ la ĉefreferaĵo de ĝia sekretario s-ano Josef Vaněček, oni sukcesis gajni 55 novajn anojn por ĈES. Oni atendas, ke la sekcio povus atingi nombron da anoj ĝis fino de la jaro 200. Valora estas lingva edukado de la sekcianoj, kiun faras s-ano Vaněček. Aliĝis 154 lernantoj!

Novaj finstudintoj de la baza koresponda kurso:

Velebová Libuše, 1946, 63500 Brno
Milan Pech, 1964, 38601 Strakonice
Sedloň Milan, 1963, Frýdek-Místek
Šibrava Petr, 1962, 19400 Praha
Sabo Juraj, 1950, 91017 Michalovce
Picka Eduard, 1932, Plzeň
Nováková Jitka, 1970, Nový Bydžov
Bláhová Magdaléna, 1974, 19200 Praha

Ili akceptu la koran bondeziron de la legantaro de VERDA FAMILIO!

S-ano Antono Járó H-4400 Nyiregiabáza, Közep u.35/, Oláh Janosné, Mandok, Hovéd ut 12, H-4644 / kaj Slezsák Ferenc, Fenyeslitke, Koszuth L u.137/ grupgvidantoj serĉas kontaktojn kun grupgvidantoj en nia lando, cele interŝanĝi vizotojn en dusemajna restado en tendaroj.

Zbyněk a Jindřiška Jonášovi, estintaj aktivaj membroj de la rondeto Mladá Boleslav, transloĝis al 34015 Poleň 84, distrikto Klatovy. Ili akceptu niaj salutojn kaj dezirojn de plena vivkontenteco en ilia nova hejmo!

Grandan Esperanto-ĉeĥan vortaron (fotokopiaĵon) de gefratoj Filip preparas reeldoni Slovaka kleriga centro, p.s.44, 15000 Pošta Praha 5. Ili akceptas firmajn mendojn kontraŭ pago de 70 Kčs (antaŭmendo por kolekti la bezonatan monsumon. Kvankam la vortaro enhavas kelkajn elmodiĝintajn terminojn precipe religiajn, ĝi estas nepre bezonata helpilo por ĉiu serioza esperantisto.

EK/MH 90/87

Kiel aboni esperantajn eksterlandajn gazetojn? Mendu ĉe Poŝta gazeta servo centra ekspedo kaj importo de preso 11001 Praha 1, Dlouhá tř.12/ sekvas 1. katalognumero, 2. titolo, 3. kiomfoje jare, 4. jara abonpago

Jak předplatit esperantské zahraniční časopisy? Objednejte u Poštovní novinové služby, ústřední expedice a dovoz tisku 11001 Praha , Dlouhá tř. 12 následuje: 1. katalog.číslo, 2. titul, 3. kolikrát ročně, 4. roční předplatné.

16151 El Ĉinio-12-348,00 Kčs -/ 20228 Bulgara Esperantisto-12-78,00 Kčs -/ 20626 PACO-6-19,00 Kčs / 20668 Scienca Mondo-4-50,00 Kčs -/ 25159 Budapesta informilo-12-66,00 Kčs 25377 Hungara Vivo-6-105,00 Kčs -/ 25423 Juna amiko-3-38,00 Kčs -/31635 Der Esperantist-12-33,00 Kčs -/ Pola Esperantisto 60,00 Kčs/.

Limdato 15.X.1987. Sed eĉ post limdato provu aboni. Ni bedaŭras, ke PNS la abonpagon de kelkaj gazetoj preskaŭ duobligis. Substrekitaj titoloj aboninda pro prezo kaj amplekso. Plej ni bedaŭras teruran plialtigon de abono de la ĉina gazeto, belega, kvankam la eldonanto mencias la saman prezon kiel en la j.1987 (10 dol.)
Malnovaj E-gazetojn sendas al Vi senpage. Skribu!

Lhůta 15.X. I po lhůtě objednejte. Litujeme, že PNS předplatné některých časopisů až zdvojnásobila. Podtržené tituly jsou vzhledem k rozsahu a ceně doporučitelné. Nejvíce litujeme hrůzné zdražení překrásného čínského časopisu, ačkoliv vydavatel uvádí stejnou cenu jako 1987 (10 dol.)
Staré esperantské časopisy pošleme Vám bezplatně. Pište!

KIEL DIRI ? (Lentaigne): Planedo: Planedo gravitas ĉirkaŭ la suno. Rivoluo de la planedoj (oběh), de satelito ĉirkaŭ la tero. Nia tero rotacias. Saturno kun ringo kaj 10 satelitoj. Plutono. NOKTO: Noktiĝas. „Descendas“ la nokto. La nokto falas. Komencas krepuski. Krepuskiĝas. Ĝis profunda malfrua nokto. La nokta silento. Sub la mantelo de la nokto. Nokte eĉ monstro estas belulo. Nokta gardisto. DIMENSIOJ-DISTANCO. Longo, larĝo, alto, diko, profundo, diametro (průměr). Doni, taksi la dimensiojn (rozměry) de ….. Mezuri la larĝon, la rapidecon, la pezon ….. Mezuro. Formato (duon-, okon- *deksesonfolia* formato). Formato de 14 per 20 centimetroj. La trabo havis la dikon de 3 fingroj. Listelo (ozdobný okraj) kiu havis la larĝon de manplato (dlaň). La strato estas 1000 metrojn longa. Ĝia alto atingas la ĉielon. 300 metroj super la nivelo de la maro, super la grundo. Konstruaĵo de imponaj dimensioj. Ĉiuj de egala longo. Ĉambro *duoble* pli longa ol larĝa. Viziti, trairi landon laŭlonge kaj laŭlarĝe. Vendi pometre. Veturi 60 kilometrojn hore. Bildo en natura grandeco. Reprodukti miniaturon je centobla grando. Liminui (= malgrandigi). La internacia buroo pri peziloj kaj mezuroj. La metro estas egala teorie al *demilionono* de la kvarono de la tera meridiano. La metro estas universala unuo de longo. La pratipo de metro kuŝas en Sevrès.

„Olomouc-urba reservejo de monumentoj“ (40p, 19 bildoj, nur E-lingva, 9 Kčs) sendas Ing František Svoboda, 77700 Olomouc, Krapkova 24.

**Korespondi deziras:** (mallongiloj: bk=bildkartoj, ĉl=ĉiu lando, ĉt=ĉiu temo, dez=deziras, iŝ= interŝanĝas, j=jaroj, kol=kolektas, kor=korespondas, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, tm=tuta mondo)
Diamancoune Lazare Koussandio.s/c Insa Faty, Senegal-Equip.B.P.1097, Dakar, Senegal – dez kor tm, katolike, kol pm.
*Fatalja* Svedencova 20j, Kirov, Maklina 302/kv78 SU-610039 studentino dez kor pri kinoarto, kuriado, kudrado, trikado
*AMOCUSSAN* Zerman Komla, s/c Toulassi Victor, B/P.4826, Lomé, Togolando – kol *E-taĵo*, propagandilojn, volas amikiĝi
*Margarita* Lapteva, 20, medicistino dez kor pri naturo, literaturo, kulturo *X X X*, Komunumo 171 kv.65, SU-610033

EK/MH 91/87

Edita Svenis, Str Pilenu 20-525, SU-235300 Penevajiŝ, Litovio, Sovetunio dez kor, kol fotojn de filmaktoroj.
Geonkloj esperantistaj: Junuloj de 8- ĝis 16 jaraj ricevos plenaĝulajn „geonklojn" el la aliaj land"oj, kun kiuj ili povas korespondi. Junuloj petu „geonklon" per letero en Esperanto al „Geonkloj Esperantistaj, s-ro W.M.Simcock, Clayton House, Butterton, Leek, Staffs.ST13 7SR, Britio (GB). Anonciĝo de helpemaj „geonkloj" bonvena.
Adkusan Zerman Komla, s/c Toulassi Victor, B.P.4826, Lomé, Togolando dez kor tm pro ĉiu temo.
Amilton JORGE, Rua *Cope* Costa 1943/282 BR-78000 Cuiaba, MT, Brazilo dez kor pri ĉiuj temoj
Aleksandro LODJAGIN, 19j,studento, SU-610039 u.Kirov str.Maklina 32-a, kv 124, dez pri poesio, ŝako, filatelio (floro, faŭno).
Celso Fernandes de Lima, Rua alto dOuro, Noll Q17 Realengo, RIO de JANEIRO Brazilo dez kor pri poesio, muziko fotoj, lingvoj.
Olga Ŝibanova, 26j, bibliotekistino, SU-61007 Kirov, Str Vorovskogo 48a kv.20, kol bk, dez kor pri kulturo.
SAEDWINI Joachim, á la Sofitex, B.P.1650, Ougadougou, Burkina faso, 33j, flegisto kur 4 infanoj, kol bildojn, fotojn. Afriko, lando ne indikita.
*Regina* Convales *da* SILVA, Rua dasLaranjeiras 462 apt 1009, 22240 Rio de Janeiro, Brazilo, 48j, eksedzino dez kor ĉt, ĉl
Judnikova Olga, SU-610004 Kirov, R.Luksenburg 34 dv 62, 32j instruististno de muziko dez kor pri vojaĝoj, kulturo kaj muziko.

xmxmxmxmxmx
xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Presaĵo 50%
Imprimé

EK MH 9/87